Esplorante tian teorion Henriko Hertz sukcesis naski je kelkmetra amplekso, elektro-magnetajn ondojn analogiajn kun tiuj de la lumo. En sia mansardo de Vilao Grifono, Guljelmo Marconi reesplorante eksperimentojn, kiujn Popof, rusa fizikisto elprovis por la registrado de atmosferaj eksplodoj, ian tagon rimarkis tute klare ke konduktiva drato starigita laŭ vertikala direkto kaj izolita de l' tero per malgranda eksplodenda interspaco, fariĝis mirinda transmetanto de elektraj ondoj, dum ĝi, tra aparato sentema al tiaj vibradoj, transformiĝis en ricevanto de l' samaj ondoj.

La unuaj mirindaĵoj — La ideo pri sendrata telegrafio trovis ĉi-tie sian unuan kampon, ekiris unuajn paŝojn al realeco; sed kiom da vojo traierota por ĝi utilaĵo! La mansardo montriĝis nesufiĉa: Guljelmo Marconi plilarĝigis la kampon de siaj eksperimentoj en herbejo

de l' vilao, dismetis siajn rudimentajn kaj misterajn aparatojn el verda plataĵo al supron de monteto, malproksime ĉirkaŭ 100 m. je la domo, kun granda miro de la vilaĝanoj kiuj lin opiniis sentaŭgulo aŭ maniulo.

Estis la printempo de 1895 kaj el kvieta vilao Grifono senprokraste diskonigis en la sciencaj medioj kaj en popolamasoj la sciigo pri la mireginda eltrovo. Dum Februaro de l' sekvanta jaro Guljelmo Marconi ricevis sian unuan patenton pri sendrata telegrafio. Ne bezone estas paroli pri apartaj teknikaj aferoj koncerne postvenintaj multnombraj fazoj pri disvolvigo kaj pri perfektigo de la eltrovo per kiuj ĝi atingis hodiaŭ mirindan utilecon. Marconi plenumis la unuan eksperimenton, tiel dirite oficialan, sur maro antaŭ la urbo La Spezia per favoro de la Itala Maristaro, en 1897^a: la 2500 m. elprovitaj ĉe la vilao, per masto de ŝipo S. Martino iĝis 12 Km.

Dum sama jaro Marconi (lia patrino Anno Jameson estis anglino) veturis Britlandon kaj tie profitante je grava helpo de l' patrina onklo, okupanta altan postenon en Londona Telegrafio, efektivigis ĉiam pli vaste la aplikadon de sia mirinda eltrovo.

De triumfo al triumfo — En jaro 1901 la Atlantika maro estis superita tra 3400 Km. inter Poldhu (Kornovaljo) kaj S. Johano (New Foundland). La mondo miriĝis, sed ne mankis personoj al kiu interesis esti tiom da entuziasmo. La angloamerika Kompanio de la kabloj vidis en la Marconi'a eltrovo timegindan konkuranton kaj alprenis ĉian rimedon por malkreditigi kaj silentigi la bruegeman venkon. Fortanima dum uragano la granda italo nur intensigis la studon kaj en 1904 sur reĝa ŝipo Karlo Alberto kiun al li disponigis la Itala Registaro, travojaĝis

la Atlantikon kie per novaj venkoj li kontraŭbatalis kaj superregis naturajn barojn malhelpintajn finan akiron de tiom malfacilega scienca fako. Triumfo sekvas triumfon. En 1903^a Marconi inaŭguras la unuan komencan radiotelegrafian linion Bari-Antivari: en 1904^a li starigas novan grandpotencan stacion ĉe Clifden (Irlando) kun samsencaj ondoj, malfermas publikan radiotelegrafian servadon inter Irlando kaj Kanado: plenumas mirigajn eksperimentojn inter Coltano kaj Mogadiŝo, aplikas ĉe grandpotencaj stacioj transmeton kaj ricevon de du radiotelegramoj en sama stacio, laŭ rapideco de 60 vortoj pominute: kaj kun ĉeesto de la Rĝo, okazas en Romo la unua aplikado de radiotelefonaj aparatoj.

Ja la celo estas atingita, kvankam la vojo malfermita de l' granda scienculo ne estas videbla ĝis la fino. La bono jam ricevita estas nemezurebla. Tra senfinaj aplikadoj, la radiotelegrafio kaj la radiotelefonio utilis kaj ege utilos al la homaro: neniu estos forgesinta la radioservon ĉe la Militego: kaj estas ĉiutaga kroniko la savado de ŝipereantoj ŝuldata al sendrataj signaloj kaj ankoraŭ estas en ĉies koro la goĝega emocio elsentita kiam la radio anoncis ke la aersipo *Norge*, surfluginte la Nordan Poluson, felice alteriĝis en Alaska.

El Domenica del Corriere, 1926, N. 26.

trad. M. Arabeno

Non si pubblicheranno nella rivista le notizie giunte dopo il 15 del mese.

Skribu en Esperanto

al niaj anoncantoj por informoj, prezaroj ktp. citante nian Revuon!

LA GRANDA AMBROZO

SANKTA Ambrozo estas la patrono de la urbo Milano, kiu gardas liajn ostojn, kaj starigis statuon je lia honoro sur la ekstera fasado de la palaco de la *Giu-reconsulti* (Juristoj).

Estas don Achille Ratti — nun Papo Pio XI^a — dum 1897, prefekto de la Ambrozana, Biblioteko kiu montris per nerefuteblaj argumentoj, ke la imago de Sankta Ambrozo, reproduktita en la mozaikoj de la kapelo staranta apud la preĝejo San Satiro, estas la plej antikva kaj la plej fidela reproduktajo de liaj trajtoj.

La granda episkopo, de ĉe l' absido de tiu preĝejo, ŝajnas ankoraŭ regadi kaj protekti, multajn centjarojn post sia malapero, la amatan urbon.

Lia elekto kiel episkopo de la Lombardia metropolo dependas de gentila kaj samtempe destina epizodo. Estis aŭtuna tago de l' 374^a jaro. Tago post tago la Milana baziliko pliplenigadis de popolo, deziranta esprimi sian volon en la elekto de sia spirita estro. La kontraŭstarantaj partioj estis fortaj, batalpretaj, kaj preskaŭ egaligadis, tiel ke malfacila estis la interkonsento.

En tiu posttagmezo la malkonsentoj estis tiel akraj, ke la diskutoj minacadis naski tumulton.

Por forigi la skandalon de ebla batalado en la domo de Dio, la urba aŭtoritato tiam decidis direkte klopodi por repacigi la ekscititajn animojn kaj gardadi la publikan ordon. Jen do, kiam pli alta kaj minaca estis la kriado, la konsulo ekrigardis tra la pordo de la baziliko, rigida kaj muta, kiel postulante re-

spekton kaj invitante la kriegantan popolamason kvietigi.

Li estis viro tridekkvarjara, maldika, kun larĝa frunto kaj viva kaj sugestia rigardo. De unu jaro li okupis la poston de provincestro de Ligurio kaj de Emilio, sed li estis jam gajninta la estimon de ĉiuj pro sia justeco, firmeco kaj plej pova energio.

Li estis ravigema kaj paroladisto entuziasmiga. Lia nomo estis Ambrozo, kaj jam de la naskiĝo al kutiminta al la ordonado, ĉar lia mortinta patro estis prefekto en Galio.

Kiam Ambrozo, jam amata de la popolo, ekaperis sur la sojlo de la baziliko, ĉiuj rigardoj direktigis sur lin, kaj la kriegado iom post iom estingigis en mallarĝa murmuro. Sed tiam, subite, infana maldika voĉo eksonis en la vasteco de la templo: « Estu episkopo Ambrozo! ». La popolamaso elektrigita de tiu alvoko naiva kaj samtempe senprijuga, ripetadis, kaj tiu nomo estis fine kriata en la tuta baziliko « Ambrozo! ».

La provincestro restas pleje surprizita, sed li ne povis kontraŭstari la volon de la popolo, kiu vokas lin episkopo, eĉ antaŭ ol li estas ricevinta la bapton. Post malmultaj semajnoj oni konsekris lin, kaj tiam komencis tiu lia mirinda plialtigado kiu faris je li heroon de la volo.

Ĉio en la vivo de Ambrozo montras en li energion, karakteron, saĝon, honestecon kaj sunluman kredon.

Estas li, kiu konvertigis Aŭgustenon, kaj Aŭgusteno admiradis lin.

Estas li, Ambrozo, kiu dum preskaŭ dudekkvin jarojn kontraŭstaris la troiuzojn de l' imperiestra povo. Kvar imperiestroj kaj

du uzurpintoj estis devigataj substari je lia supera, nefleksebla volo. Ĉiam li estas tiu, kiu venkas, proklamante, ke la forto de la kristana pastro kuŝas en lia senarma malforteco mem.

Lia plej bona sukceso — diras Buonajuti — estis tiu atingita kontraŭ la Roma Senato, kiu petegadis de la imperiestro la restarigon de unu el la respektegataj simulakroj de la roma paganismo, la altaron de la Viktoro (t. e. de la Venko diigita) en la senata salonego.

Estas ankoraŭ li, kiu al la senditoj de Valentiniano kaj de Justiniano, kiuj malgentile kaj absolute ordonadis, ke li transdonu al la Arianoj la bazilikon, kaj samtempe ke li malpermesu ĉiun ajn popolan manifestacion, respondis: « Pastro de Dio povas allasi al neniu sian propran templon! ».

Estas ankoraŭ li, kiu sur la sojlo de la templo malpermesis la eniron al Imperiestro Teodozo, akompanita de la tuta kortego. La epizodo estas memorinda. Teodozo estas preparinta al la logantaro de Tesaloniko barbaran trompilon. Dum ĝi multenombre ĉeestadis la spektaklon, centurioj da soldatoj, per elingigitaj glavoj, enirintaj la amfiteatron, furioze buĉadis virojn, virinojn kaj infanojn. Tiu teruriga kaj kruelega buĉado daŭris tri horojn sinsekvajn. Pluraj miloj da personoj restadis sur la sablo atesti la kruelecon de despoto, kiu per tiu ago intencis montri sian povon! Kiam la informo de tiu mortigado alvenis Milanon, kriego de indigno ellevigis ĉiuflanke.

Ambrozo interpretas la popolan indignon. Kiam Teodozo sin prezentas al la templo, li, staranta sur la sojlo, kiel reviviginta Nemezo, malpermesas al li la eniron. Kaj ĉar Teodozo, konfuza kaj ŝanceliganta por la neatendita akcepto, citas la ekzemplon

de Davido, — Ambrozo respondas al li: « Ci imitadis lin en la krimo, imitu lin ankaŭ en la pento! »

Rubens kaj Van Dyck reproduktis la scenon en siaj neimiteblaj pentraĵoj. Kaj la historio raportas ke Teodozo klinis la kapon ĉe la ordono de la episkopo por esti reallasata al la liturgiaj ceremonioj.

La senĉesa kristana propagando de Ambrozo donis fruktojn ankaŭ en aliaj kampoj. El Piacenza, Bologna, Venezia, kaj eĉ el la malproksima Nordafriko alkuradis junulinoj al Milano por monahinigi. Juj timis pro tiu epidemio spirita sed Ambrozo respondis: « Mi aŭdis ke iu diras ke la mondo ruinigas, ke la homa raso neniigas, ke la edzigoj timige malmultiĝas... Sed, diru, favore, kiu iam serĉis edzinon kaj ne trovis unu? » Tiu respondo, iom mokema, montras novan aspekton de la animo de la Sanktulo.

Estas ankoraŭ li, la granda Ambrozo, kiu aperas kiel vizio, al la soldataro de Azzone Visconti en Parabiago, kun la ŝkurĝo en la mano, kiel li estas montrita sur la gonfalono en la Sforza kastelo (Milano) por kuragigi la milananojn en la batalo kaj ilin konduki al la venko.

Li ĉiam estis vigla, preta, agema, genia, kiel la milana popolo. Li ripozas nun en la kriptoj de la baziliko, kiu estas nomata de Li, eble kontenta dormadi la lastan dormon en tiu Milano, kiun li tiel multe amis, kaj kiu fieras respekteni lin kiel protektanton, sanktulon kaj heroon.

ADOLFO PADOVAN en *Corriere della Sera*.

trad. A. L. Rent

Il miglior premio a coloro che si sono distinti durante i corsi è senza dubbio un abbonamento alla

ITALA ESPERANTA REVUO

ARDUINO DE IVREA

ARDUINO markizo de *Ivrea*, iam vokis al si siajn tri filojn, kaj rakontinte la fabelon de la lignohakisto, admonis ilin neniam apartigi unu de la alia. Poste la fiera maljunulo, provizinte al la filoj, retiris sin en la Abatejon *Fruttuaria* (nun *S. Benigno*), kiun li mem fondis, kaj tie, demetinte la regajn insignojn, monaĥigis kaj preĝis la Sinjoron.

Arduino ne monaĥigis tuj post la ekskomunikoj de Sankta Veremondo, episkopo de Ivrea, kaj la malbeno de la sanktulo malhelpis lin supreniri de la markiĝo al la reĝa rango.

Elektita reĝo de Italio, li batalis dek kvin jarojn kontraŭ episkopoj kaj imperiestroj. Post perfido flanke de granduloj (sed konsilita de fideleco de liaj montaranoj), la monaĥejo de *Fruttuaria* ricevis lin, ne kiel pentinton kaj submetiton, sed kiel senigitan de la fortoj, kaj satigitan de la mondumaj grandecoj.

Li mortis la 14-an de decembro 1015^a, kaj li estis entombigita kiel reĝo en la preĝejon de tiu monaĥejo, kie li dormis pace 600 jarojn. Sed dum deksepa jarcento, kardinalo Ferrero, memorinte la malnovajn episkopajn ekskomunikojn, volis purigi la preĝejon de la ĉeesto de kadavro trifoje malbenita.

Li malfermis la tombon, forportis la regajn insignojn, t. e. sceptron, kronon kaj ringon, kaj poste enterigis la ostojn senrespekte en la apuda legomgardeno. Sed pia monaĥo plantis signon sur la tero kaj avertis pri la sakrilegio graŝon *S. Martino d' Agliè*, pranepo de Arduino.

Tiu ĉi elterigis la ostojn dufoje ĝenitajn de la reĝa praavo, kaj transpor-

tis ilin, fermitajn en ligna kesteto, en sian kastelon. Sed ĉi tie haltis la fervoro de l' grafo. La kesteto fermita en sakristia ŝranko nek estis honorata per monumento nek havis pacan certecon.

Cent jarojn la granda fantomo restis tie senpace.

En 1750 *Carlo Emanuele III* el *Savoia* petis de la posedanto markizo *Giuseppe* (Josefo) la kastelon, kiu estis vendita kun ĉiuj mebloj inter kiuj, eble nekonata aŭ forgesita, tunebran kesteton enhavanta la mortrestaĵojn de reĝo Arduino.

Sed markizo edziniĝis kun *Cristina* de *Saluzzo Miolans*, virino de altaj sentoj al kiu malplaĉis senigi je tia plezuriga vilao. Ŝi opiniis ofendon al si, kion markizo faris cedante kune kun la kastelo, ankaŭ la restaĵojn de tiu reĝo, ilia komuna devena komenco. Tiu ĉi afero malplaĉis ankaŭ al grafo *Carlo Francesco Valperga* el *Masino*, pranepo de Arduino, kiu volis por si la regajn restaĵojn.

Tiam markizino *Cristina*, kiu amis ne reamita la graŝon el *Masino*, foje, nokte, vintre, foriris el la kastelo kun nemultaj domservistoj, kaj postnoktomeze alvenis en la kastelon de *Agliè*.

Multaj el la antikvaj servistoj de la markizo faris kun la domo la servadon de la Kortego, kaj inter ili ankaŭ la gardisto.

Markizino *Cristina* vekigis la gardiston, kaj ordonis al li lumigi la marŝon tra la ĉambroj. Al maljuna gardisto tiu ordono, kaj la kutimo al obeo, forgesigis la novan posedanton Li riverencis serveme kaj akompanis la markizinin tra la ĉambroj kaj la salonoj ĝis la preĝeja sakristio. *Cristina* malfermis la ŝrankon, forprenis la kesteton, kaj poste revenis al

veturilo, kaj for en la nokto! Tiel reĝa moŝto Arduino, post okcent jaroj, retransiris siajn teritoriojn, kaj *Cristina* sidis flanke de li, bela, juna, respektama gardistino. Kaj eble la unuan fojon, en tiom da jarcentoj, virino preĝis pacon por li. *Reĝo Carlo Emanuele III* el *Savoia* estis informita pri la rabado, sed li pardonis.

Nun la mortemaj restaĵoj de Arduino dormas en kastelo de *Masino*. La tombo, kiu enhavas ilin, estis malfermita lastafoje en 1827, sed per granda religia pompo, en ĉeesto de reĝo *Carlo Felice* kaj de reĝino *Maria Teresa*. La ostoj benitaj estis fine refermitaj en la tombo, kiu estis ornamita de la reĝa ŝildo.

Kvaroble Arduino, markizo de *Ivrea*, postmorte revidis la lumon de la suno...

El itala trad. Angelo Pini

Internacia Radio-Asocio

En la junia numero de nia ĵurnalo estis erare notita la nomo de *Internacia Sekretario* de la Internacia Radio-Asocio. Tinn poste nun okupas s-ro E. Aisberg (18, rue Gérard, Paris 9^e - Francujo).

La I. R. A. eldonas krom la ĵurnalo *Internacia Radio-Revuo* (1/2 dolaro jare; 40, rue de Seine, Paris 6^e) ankaŭ samtitolan ĵurnalon por blinduloj en punktrelefaj literoj (H. Thilander, Majorsgatan 12, Stockholm, Svedujo). Pri tiu lasta revuo, kies speciala karaktero (nur blinduloj-radiistoj-esperantistoj!) estas atentinda, ni ankoraŭ parolos pli detale.

Internacia Esperanta Ludkartaro

Per ĉi tiu ornamita esperanta propagandilo (12.2x6.9 cm.) estas ludebla la plej multo da kartludoj.

La sakludo estas ankaŭ aplikata

Prezoj: Simpla Ludo L. 25 — Luksa L. 32

La ludkartoj estas regule depagstampitaj.

Hotelo kaj Pensiono
"MINERVA,"
... VENEZIA ...

Unuaranga kaj rekomendinda restadejo por Esperantistoj. - Tute renovigita dum 1925. - Trankvila kaj urbocentre lokata. - Moderna komforto. - Ĉiu ĉambro kun fluanta akvo. - Esperanta servisto ĉe la fervoja stacidomo. - MODERAJ PREZOJ. En- kaj elŝipigejo S. Zaccaria

"DE ALPOJ AL LA MARO"
PRISKRIBOJ DE LA ARTAJ KAJ NATURAJ BELAĴOJ DE ITALIO

JUS ELIRIS LA UNUA KAJERO:

ITALIO

(24 paĝoj kun 52 ilustraĵoj)

PREZO: Por Italio L. 2.50 — Por eksterlando L. 3.—

PER L'ACQUISTO DI LIBRI consultare sempre, oltre i numeri ultimi della rivista, il nostro CATALOGO N. 2, che viene spedito gratuitamente a semplice richiesta.

LINGVA KOMITATO ELEKTOJ

Anoj 111.

Vocdonintoj 103.

Reelektita: S-ro Stroele.

Elektitaj: S-roj Bennemann, Černohostov, Döhler, S-no Dresen, S-roj Eilersiek, Grau-Casas, Grenkamp-Kornfeld, Grot, Karolczyk, Kosteccki, Kreuz, La Colla, Pillath, Rossellò-Ordines, Scott, Warighien.

31 Majo 1926.

La prezidanto
TH. CART

ITALA KRONIKO

Roma. La 13-an de junio la Roma samideano promenadis al la Abatejo *Tre Fontane*, kie loĝas la Trapistaj monaĥoj. La multnombraj gesperantistoj, novaj kaj malnovaj, tuje interkonatiĝis: la ĝentilaj samideanoj dolĉigis la mulfeliĉecon de la vivo per disdono de bonegaj sukeraĵoj.

La 27-an, alia promeno al la *Pineta Sacchetti*. Pluvego, kiu falis malmulte da tempo antaŭ la horo de la kunveno, ne timigis la obstinan gesamideanaron. En la herbejo de l' pinarbaro oni legis amuzajn esperantajn versojn kaj spritaĵojn: grandan ridadon kaŭzis ĉi samideano per legado de rimoj, kiujn li mem verkis, itale kaj esperante: la malfeliĉaj versoj estis tute... lamaj! La... poeto terurigis la ĉeestantaron per promeso de novaĵ rimoj la venontan fojon!!!

S. Vito al Tagliamento. Laŭ iniciato de loka Helpa Laboristar-Societo, kiu afable metis je dispono sian sidejon, dimanĉon, la 18-an de Julio, s-ro Raffaello Vannucchi (Viceprezidanta de Udine'a Esperanto-Grupo) brile kaj longe parolis pri nia movado. La paroladinto estis fine ege aplaudita. Aro da Udine'aj samideanoj ankaŭ ĉeestis.

Torino. Torinaj samideanoj festis la fermon de la esperantaj kursoj per bela kaj interesa promeno al Rivoli-Giaveno-Laghi Avigliana, sub gvidado de la Prezidanto inĝeniero Giovanni Cenero.

Ĉeestis ankaŭ fremdaj samideanoj, s-ro Sidi (Bulgara), kaj s-ro Ĉefo Fizo (albana).

Udine. Por antaŭenpuŝi kaj plivigligi la ĉi tian propagandon la loka Grupo organizas

publikajn paroladojn, kiuj okazas dufoje ĉiunmonate, ĉe urba Ĉambro por publikaj kunvenoj; la paroladtemoj estas elektitaj libere de la oratoroj mem laŭ instru-kaj interesaj vidpunktoj. La 23-an de Junio, nia Gruposkonsilanto Kav. Libero Grassi, parolis pri urbaj historiaj okazintaĵoj kaj, speciale, pri la historio de la iama Reĝa Juĝejo (ĉe kies Palaco ankaŭ nia Grupejo troviĝas). La 7-an de Julio, altlerneja Profesoro A. Lami afable konsentis deklami versaĵojn de iuj el la famaj dialektaj poetoj: Trilussa, Pascarella k. a. Estas nenecese aldoni ke ambaŭaj paroladoj plej kontentige kaj bone sukcesis kaj la multnombra ĉeestintaro (per specialaj cirkuleroj invitita kaj per taggazetoj informita) spirite ĝuis, dank' al Esperanto-Grupo, la instrupleajn vesperojn. Loka gazetaro favore kaj longe raportis.

Aliajn... surprizojn nun la Udine'a Grupo preparas sed, pri tio ni pli poste, kaj tiam plej detale, informos.

DANKESPRIMO

Reveninte de rondvojaĝo tra la tuta Italio, kiu mi faris ĉiam helpita de afablaj gesamideanoj, estu al mi permesate, diri kelkajn parolojn. Antaŭ ĉio parolu de danko. Ne estas al mi eble citi ĉiujn nomojn de tiuj, kiuj helpis min tiom ĝentile, sed kelkajn mi tamen volas nomi, kiuj faris al mi gravajn servojn, ĉu mendante ĉambrojn, ĉu gvidante min, ĉu almaniere helpante min. Do, koran dankon al s-roj Prof. Grazzini, D-ro Stromboli, D-ro Bruno Migliorini, Prof. Cumin, Magliolo, Prof. Cavallaro, S-ro Cappabianca kaj multaj aliaj, kies nomojn citi, malpermesas la limigita loko. Komprenable mi vizitis ankaŭ diversajn grupojn kaj kun ĝojo mi konstatis, ke la vizito de la rondvojaĝo estas bonega, ke oni ne nur unufoje posemajne kunvenas, sed ĉe tri — kaj kvarfoje. Ankaŭ la vivo en la grupoj estas modela. Apud serioza laboro de kursoj regas ĉe gaja bonhumoro kaj amuzado, kion mi por varbado de novaj membroj nepre rekomendas, ĉar nuraj kursoj kaj kursoj neniam daŭre povas teni en niaj vicoj la gesamideanojn, sed ni devas esti entute kulturaj societoj, kaj en tio la italaj gesamideanoj agas imitinde.

Resume mi konfesas, ke mi en la diversaj E. rondvojaĝoj la bela Italio pasigis neforgeseblajn tagojn, kiujn mi ĉiam rememoros kaj mi esperas, povu iri alian fojon denove en la suplemen Italion.


Joh. Bernard München

NECROLOGIA - Il Sig. Gustavo Belli, attivo Segretario dell' A.N.E.E., è stato colpito dalla dolorosa perdita del proprio Genitore avvenuta il 14 Giugno u. s. in Rimini. - All' egregio samideano ed alla sua famiglia la più sentite condoglianze.

MALGRANDAJ ANONCOJ

Grava esperanta ĵurnalo serĉas kaj bone pagos diligentaĵojn kunlaborantojn.

Skribu: *Vulco* — Talcech 1 — Torino.



HARRY A. EPTON: *The International Radio Manual*, London, The British Esperanto Association, Inc., 17 Hart Street, W. C. 1 - 1925, prezo 6 d.

Tiu ĉi verko enhavas radio-kurson de Esperanto kun ekzercoj, duoblan radio-vortaron, radio-simbolojn kaj mallongigojn, kaj fine informojn pri Internacia Radio-Asocio kaj pri la Esperanto-movado. La aranĝo estas bone zorgita, nur la bildoj ne estas klaraj. Pri la Morse-kodo en Esperanto, ni miras tial ke oni ne uzis por la litero ŭ la signon internacie konatan por ŭ anstataŭ tiun por la simpla u. Pri la vortaroj ni rimarkas kvanton da radikoj ne bezonataj: ŝajnas ke ĉiuj radiovortaristoj vetis pri abundeco da novaj radikoj; sed la interna krizo de la lingvo teknika (ĉu afiksoj, ĉu internaciaĵoj? nu, ambaŭ!) nenie montriĝis tiel klare. Ekz.: *alternilo see alternatoro, detektilo see detektoro*, ktp., ktp., ktp.... Ni jam proponis la akcepton de taŭgaj sufiksoj jam internaciaj: unuavice *-or-*, kaj sekve *-ad-or-*; poste *-iv-*, *-ane-*, *-lz-*. La tendenco de la teknika esprimaro pri la sciencidaj fakoj estas ĉef en la naturaj lingvoj por la reguligado: kial nur teknika Esperanto emas fariĝi simpla kolekto de diversdevenaj kaj senordaj terminoj? Oni diras (l. a. D-ro Corret diras) ke teknikistoj ne bezonas facilecon kiom nekleruloj, kaj sekve la afiksa sistemo ne estas por ili tiel utila: sed ili ja bezonas precizecon, kaj kiel ĝin atingi sen afikso-ema metodo? Ĉu la procedo de nacilingva kemio ne estas instruanta?

Ni do povas aprobi nek la uzon de apartaj radikoj entenantaj internacian sufikson (*akumulator-*, *alternator-*...), nek la uzon de malnovaj sufiksoj maltaŭgaj, kiel plej ofte *-il-* (*alternilo, konduk(t)il-o...*). Ĉiuj radio-vortaroj enhavas lingvan difektaĵon: ni marŝas blinde sur danĝera vojo. La klasika arkitektema konstruado de Esperanto riskas perdiĝi pro miskompreno de la fama 15-a regulo, kiu rilatas ĝenerale al kerno-radikoj, ne al apartaj devenvortoj.

La enhavo de ĉi tiuj vortaroj estas sufiĉe riĉa. Riproĉindaj vortoj estas i. a. la bedaŭrinda kurento anst. *fluo*, kiu tute sufiĉas ĉie, krom en angla; *kontinua* anst. *samsenca*: *amplifil* anst. *ampligi* (radiko *ampl-*, komparu *ampleco* (stato), kiu malĝuste estas tradukata per *amplifeco*); *interruptoro* anst. *interrompilo*; *karbono*, *kurvo*, *ŝarĝi*. Diskutindaj estus *rektifil* (rektigi), *relajo* (relajso), *drato* (fadeno). Aliaj terminoj estas, kiuj ŝajnas ne nepre bezonataj. Tamen esence la verko estas sufiĉe klasikema, valora kaj rekomendinda por angla-lingvanoj senfadenistoj.

R. SCHWARTZ, *Verdkata testamento*, Parizo, Esperanta Presejo Solsona, 1926, pp. 122. 10 Fr.

La *Kabaredo de la Verda Kato* estas pariza kafejo, en kiu kunvenas ĉiumerkrede gajaj samideanoj por verki amuzajn kaj mokajn kantetojn kaj prezenti mallongajn spritajn teatraĵojn. Tiu ĉi *Verdkata testamento* estas kolekto de 74 poeziaĵoj, plejparte kanteblaj laŭ konataj arioj, en kiuj oni sprite (ĉe kelkfoje iom libere) ludas per dusencaj vortoj (litografo: lito grafo; katalogo: kata logo, ktp.) aŭ oni ŝercas pri esperantaj aferoj.

S-ro Schwarz krom granda sprito montras bonegan konon de la lingvo.

E. W. LORD, Benjamin F. Smith, *Historieto pri elfarado*. Boston 1925, pp. 18 kaj portreto.

La libreto bele bindita kaj bone presita rakontas la vivon de usona biennlo, kiu per laboro longjara kaj honesta sukcesis ege riĉiĝi. Li dezirus ke la verketo helpu al la studentoj konstati la gravan faktoron ke sukceso ekonomia dependas de la intimaj virtoj: ŝpavimo, kuraĝo kaj laboremo.

Esperanta Akademio. Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio 1926. Parizo, Esperantista Centra Librejo, 1926, pp. 32. 2 Fr.

Tiu ĉi broŝuro enhavas: la Regularon de la L. K. kaj la liston de la 127 Lingva-Komitatoj (16 angloj, 20 francoj, 25 germanoj, 6 italoj ktp.). La akademianoj estas nuntempe 17 (unu posteno estas vakanta). Je la fino de la libreto estas la oficiale konsilita listo de la landnomoj.

Tipografia Editrice A. Paulet, S. Vito al Tagliamento A. Paulet, dir.-reep.

B. kaj E. MIGLIORINI

Esperanta Legolibro

Volumo de 144 paĝoj dividitaj en tri partoj:

I. TRA LA VIVO — II. TRA LA LINGVO — III. TRA LA LITERATURO

JUĜOJ DE LA GAZETARO

Ni ne mankas je bonaj legolibroj; la aparta gusto de iliaj aŭtoroj montriĝas en la elekto de la tekstaro; tiun de B. kaj E. Migliorini, mi komparas kun la bonega unua legolibro de Kabe pro la varieco kaj intereso de la enhavo: anekdotoj, legendoj, studoj pri lingvo, stilo aŭ esperantismo, elĉerpajoj el fremdaj literaturoj, kelkaj poezioj inter la prozaĵoj. Vere la elekto estas tute taŭga kaj la legolibro certe estos inter la plej ŝatataj de lernantoj.

G. S. en *Esperanto* de U.E.A., nov. 1925.

Ekzistas ja jam sufiĉe da legolibroj, mi konstatas, kaj ĉiu lando deziras havi sian propran — tio ja estas fakto komprenebla. Legolibro feliĉe estas uzbla en ĉiu ajn lando alilingva, do ankaŭ ĉi tiu nova eldonaĵo itala. Ĝi estas inda, la enhavo zorge elektita, kaj tio estas la ĉefaĵo. Mi legis partojn tie kaj tie ĉi kaj povas konfirmi, ke la presitaj artikoloj ktp. estas ĉiuj bonstilaj kaj modelaj (de Zamenhof, Cart, Privat ekz.) kaj per tiu ĉi fakto tre bone servos al la legantoj ĉu izolitaj, ĉu en grupoj. Mi urĝe rekomendas ĉi tiun novaĵon ankaŭ al la ne italoj kaj ĝojas, ke ĉi tiu verko zorge kunmetita estas inter la Esperantaĵoj.

Charlotte Pulvers, Basel, L. K. en *Marto*, dec. 1925.

La libro konsistas el tri partoj. La unua parto (Tra la vivo) enhavas mallongajn, kaj facilajn legaĵojn. La dua (Tra la lingvo) pri-traktas lingvajn kaj historian demandojn kaj la tria (Tra la literaturo) kunkolektas mallongajn literaturaĵojn de famaj nuntempaj samideanoj. La hungarojn inde reprezentas Kalocsay kaj Baghy. Ni ĝojas, ke la vico de legolibroj pliriĉiĝis kun tiu ĉi vere valora libro.

Hungara *Esperantisto*, Jan.-feb. 1926

La libro enhavas multajn tre oportunajn legaĵojn por la konversacioj en la kursoj. Tial oni ankaŭ rekomendas ĝin al niaj kursgvidantoj, al kiuj ĝi liveros interesan kaj uzublajn materialon.

Konkordo, dec. 1925.

Prezo de la volumo: Italio L. 4 — Eksterlande L. 5.

Mendojn al la eldonanto A. PAOLET en S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italio)

Antikva monumento de itala literaturo

LA FLORETOJ DE SANKTA FRANCISKO

JAM APERIS la esperanta traduko de tiu ĉi ora verko de la unuaj tempoj de la itala literaturo. Gustatempe ĝi aperas, ĉar la sepa jarcenta datreveno de la morto de la granda itala sanktulo, kiun la tutmondo honoras, rememorigas unu el la plej eminentaj homoj kiuj vivis sur terglobo.

LA FLORETOJ priparolas pri Sankta Francisko, pri multaj liaj kunfratoj kaj pri la rapida disvastiĝo de tiu religia Ordeno, kiu konkeris spirite la tutan mondon kaj al kiu multe ŝuldas la nuntempa civilizacio.

La originala stilo de la verko, stilo rakonta, naiva sed tre elokventa, transportas nin al tiu tempo, en kiu la priskriba forto estis pro sia simpleco pli trafa al la sentoj de la popolo.

La esperanta traduko, farita tre diligente de nia lerta samideano F. Pizzi, tute ne perdas la unuan stilon, tiel ke eĉ en Esperanto la verko sin prezentas en sia tute originala kaj simpatia formo.

La eksterlandaj samideanoj sendube salutos kun plezuro la aperon de tiu ĉi traduko, kiu donas al ili la eblon de la ĝojiga legado de unu el la plej legindaj verkoj de la antikva itala literaturo.

Samtempe la italaj esperantistoj devas ĝoji, ĉar per la esperanta traduko la verko, kiu apartenas al la unuaj gravaj monumentoj de ilia patruja literaturo, povas esti konata en la tutmondo.

La volumo estas presita sur bona papero per klaraj preslitoj, kaj ĝi havas artan kovrilon laŭ stilo de la epoko en kiu vivis la sanktulo.

Pro la gravaj elspezoj de l'eldono la prezo estas iom plialtigita.

Unu ekzemplero kostas: L. 8. — Komuna eldono L. 6.

Mendu tuj al eldonanto A. PAOLET, S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italio)

Okaze de la VII FRANCISKANA CENTJARA DATREVENO legu:

BIOGRAFIO DE S. FRANCISKO EL ASSISI (Carolfi) . . . L. 3.—
TRA LA FRANCISKANA URBO ASSISI (De Carolis) . . . » 2.—
LA PADOVA LILIO (Biografio de S. Antonio el Padova) (Carolfi) 5.—

(Por sendelspezoj aldonu; itallande 10 kaj eksterlande 25 %)

I due Manuali più in uso in Italia :

Dott. A. STROMBOLI

Manuale Completo

per lo studio della lingua internazionale ausiliaria

ESPERANTO

VOLUME DI PAGINE 248 (TERZA EDIZIONE - 16° MIGLIAIO)

CONTIENE:

Il problema di una lingua internazionale e l'Esperanto
Storia dell'Esperanto — Grammatica in dieci lezioni con copiosi esercizi
Prose — Poesie — Frasi di conversazione — Corrispondenza commerciale
Vocabolario Esperanto-Italiano (*carta verde*)

Vocabolario Italiano-Esperanto (*carta rosa*)

PREZZO L. 5.50 (franco di porto)

B. MIGLIORINI

Manuale di Esperanto

in dieci lezioni con due vocabolarietti

(III E IV MIGLIAIO)

PREZZO L. 2.75 (franco di porto)

Presso le principali librerie del regno e presso l'Editore A. Paolet in S. Vito al Tagliamento